

Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2009

Okazintaĵoj

Klubaj kunvenoj

Dum 2009 okazis entute 17 ordinaraj klubkunvenoj, 1 jarkunveno, 2 festoj (Ĝardena kaj Zamenhofa) kaj 5 estraraj kunvenoj. Ne okazis vortaraj laborkunvenoj en 2009. Male al la antaŭa jaro, en 2009 GET partoprenis en la popola procesio la 17an de majo.

En la ordinaraj klubkunvenoj partoprenis inter 4 kaj 10 membroj, meznombre 6,5 (meznombre en 2008: 6,6; en 2007: inter 6 kaj 7 personoj; en 2006: iom malpli ol 7). Ĉiuj kunvenoj kaj festoj okazis hejme ĉe membroj.

Por la plimulto el ordinaraj klubkunvenoj oni preparis temojn, pri kiuj respondecis specifaj personoj, ĉu estis prelegoj, prezentoj aŭ io alia. Dume aŭ poste okazis konversacioj pri la temoj, kaj ĉiam okazis ankaŭ kafklaĉo post la oficiala programo. Tiel la kunvenoj ebligis al membroj praktiki la lingvon. Komence de la kunvenoj ekde septembro Judith Parelle Abrahamsen prezentis malnetajn tradukojn de Pondus-strioj por diskutado en la klubo, okaze de iama onta eldono. La ordinaraj klubkunvenoj estis studkunvenoj kaj do subvenciitaj de la ŝtato pere de la studorganizo Populus. Temoj en 2009 estis:

- «Vagabondaj lingvoj». Pri romanes kaj ankaŭ pri sekretaj lingvoj kiel mǎnsing.
- «Norvegaj pladoj». Prelego pri kaj manĝado de fermentitaj fiŝoj, lesivitaj fiŝoj, norvega ŝimfromaĝo ktp.
- «Tradukado de Pondus». Prelego pri la traduklaboro, kun ekzerco.
- «Kiel malsaniĝi per sia laboro». Anekdotoj de la Labora Inspekcio. Oni povas malsaniĝi en la kloakejo, se oni faligas arbon, laboras per grandaj bienaj maŝinoj, falinte en la fekaĵujon, se oni havas alergion, ktp.
- «Io kion mi spertis/vidis/aŭdis hieraŭ». Ĉiuj rakontis pri siaj spertoj kaj travivaĵoj.
- «El la Esperanto-historio de Trondheim». GET ne ĉiam estis la sola Esperanta grupo de Trondheim, kaj ekzistis studrondo kun 4 homoj jam en 1905–06.
- «Kuirado». Ni bakis naan-panon kaj kuiris buterkokidaĵon, kaj manĝinte ni spektis ferian filmon pri Barato.
- «Genealogio per nova teknologio». Multaj gravaj historiaj dokumentoj nun ekzistas en Interreto, sed daŭre ekzistas la ĉiamaj problemoj kaj danĝeroj de tiaj dokumentoj.
- «Filmoj». Prezento de filmoj kiuj iel rilatas al Esperanto.
- «Amnestio Internacia». Prezento pri la historio kaj laboro de tiu organizo.
- «Bildoj kaj rakontoj pri la Universala Kongreso en Bjalistoko». Ni vidis bildojn kaj aŭdis rakontojn pri la spertoj en Pollando.
- «La maljunuloj kaj la socio». La socio estas por la junuloj. Ekzemple, bankoj supozas ke ĉiuj havas retkonekton kaj estas spertaj pri teĥnologio.
- «Skotlando». Ni vidis bildojn, aŭdis rakontojn kaj spektis filmetojn de du vojaĝoj al Skotlando.
- «Imperativo». La Esperanta imperativo estas pli vaste uzata ol la norvega imperativo.
- Dum unu kunveno ni forgesis pri la ĉeftemo kaj nur laboris pri Pondus-tradukoj.
- «Ĉiuj rekomendas libron.» Kaj du klubanoj eĉ volis vendi la librojn.

Aldone al la jam menciitaj kunvenoj okazis neoficiala kunveno la 16an de aŭgusto, kiam aŭstralia esperantistino (Indrani Beharry-Lall) vizitis Trondhejmon.

Varbado, kursado kaj informado

En 2009 okazis kurso kun entute kvar lernantoj. Instruis Torstein Kvakland.

Membrostatistiko

Fine de 2009 GET havis 20 membrojn (2008: 21; 2007: 23; 2006: 25).

Partopreno en naciaj aranĝoj

Kvin GET-anoj kiuj loĝas en Trondheim kaj du kiuj loĝas en Os, partoprenis la Landan Kongreson en Os.

Kvar GET-anoj invitiĝis kaj ĉeestis en la akcepto de NEL en Bergen la 18an de septembro, dum kiu NEL-prezidinto Elna Matland ricevis la Reĝan Arĝentan Medalon Pro Merito.

Partopreno en internaciaj aranĝoj

Ses GET-anoj (inkluzive de unu kiu ne loĝas en la urbo) partoprenis la Universalan Kongreson en Bjalistoko. Por NEL salutis Jardar Eggesbø Abrahamsen, dum Torstein Kvakland reprezentis NEL-on kiel Komitatano A. En 2008 la esperantoklubo de Darmstadt (Germanio) iniciatis amikajn rilatojn kun GET, kaj dum la UK en Bjalistoko membroj de la grupoj renkontiĝis por babili, manĝi kaj trinki kune.

Vortara laboro

En 2009 ne okazis laboro pri la nova vortaro, ĉar la responsulo pri la praktika laboro, Kjell Heggvold Ullestad, devis doni prioritaton al alia laboro. Kunordiganto pri la vortara laboro de GET estis ankaŭ ĉi-jare Herman Raner.

Interreta aktivado

GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar Eggesbø Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Li ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith Parelie Abrahamsen administris la NJE-liston ĝis la somero, kaj daŭre administras la paĝaron de NJE. Je la jarfino membris 25 en la retpoŝta listo de GET (25 en 2008, 26 en 2007, 24 en 2006). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2009 sendiĝis ĉ. 65 mesaĝoj per la listo.

Oni dissendis klubkunvenon per reta televido (la 3an de marto, la kunveno «Tradukado de Ponus»). Ĉeestis 5 spektantoj. La dissendon mastrumis Jardar Eggesbø Abrahamsen.

Biblioteko

La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Raner. En 2009 okazis unu pruntedono: La bibliotekestro pruntedonis al si mem por montri libron al la klubo.

Arĥivo

La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

Pasporta servo kaj aliaj vizitoj

PS-gastigantoj en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/Christian Fossen. Ĉe Ulf tranoktis japana esperantisto. Ĉe Torstein kaj Christian tranoktis aŭstralia esperantistino.

Organiza numero

GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund la 21an de decembro, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj rajtas ricevi monon de Norsk tipping se iliaj klientoj volas.

Postenoj

Estraro dum 2009, elektita de la Jarkunveno la 17an de februaro

Prezidanto: Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto, sed nova posteno)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (nova)

Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 17an de februaro

Kunordiganto de la vortara projekto: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Revizoro: Jørgen Åldstedt (reelekto)
Vicevizoro: Arne Olav Mjøen (nova)
Elekta komitato: Jørgen Åldstedt kaj Arne Olav Mjøen (novaj)

Eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj

Prezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Sekretario de NEL ĝis la somero: Ulf Lunde (loĝanta en Os en Hordaland)
Vicprezidanto de NEL post la somero: Ulf Lunde (loĝanta en Os en Hordaland)
Vicevizoro de NEL: Ulf Stenhaug
Prezidanto de NJE ĝis la somero: Judith Parelie Abrahamsen
Sekretario de NJE: Einar Faanes (loĝanta en Stockholm)
Prezidanto de Legaco Uhlen ĝis la somero: Christian Fossen
Estrarano de Legaco Uhlen: Arne Olav Mjøen
Persona anstataŭanto por Arne Olav Mjøen en Legaco Uhlen ĝis la somero: Torstein Kvakland
Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes kaj Kjell Heggvold Ullestad

Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj

Revizoro de NJE: Arne Olav Mjøen
Elekta komitato de NEL ĝis la somero: Judith P. Abrahamsen, Knut Lyngstad
Elekta komitato de NEL ekde la somero: Christian Fossen
Domkomisionanoj por NEL: Torstein Kvakland, Herman Ranes

Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen
Komitatano A de UEA: Torstein Kvakland
Respondeculo de la TTT-paĝaro de NJE: Judith Parelle Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaug
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegitoj de UEA: Ulf Lunde (komputiko), Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingviko) kaj
Tomas Jansson (onkologio)
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith Parelle Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj
Inter Ni Dirite)
Paguta laborunto de la redakcio de la nova vortaro: Kjell Heggvold Ullestad
Aliaj membroj de la redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Herman
Ranes

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.

Aprobata de la Jarkunveno de GET la 23an de februaro 2010.